

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum kelkaj monatoj ni turnos nian atenton al la vivo, penso kaj verkaro de Hector Hodler, unu el niaj valoraj verkistoj. La pasintan semajnon ni vidis, ke la 13- kaj 15-jaraj gimnazianoj Edmond Privat kaj Hector Hodler ricevis la viziton de naŭdekjara filozofo, kaj ke ekde tiu vizito ili devis semajnon post semajnon viziti tiun faman maljunulon Ernest Naville por raportoj pri la progresoj de esperanto.

A.- Sed, se esperanto progresis, tiu progreso ne estis tre favora al la studoj de Hector Hodler. Ni scias, ke, nome de la ĝenevanoj, la juna Edmond Privat invitis la esperantistojn en Boulogne-sur-Mer okazigi la duan Universalan Kongreson en Ĝenevo. Sed organizi Universalan Kongreson ne estas eta afero.

Cl.- Antaŭ ol fini siajn gimnaziajn studojn Hector Hodler forlasis la lerneajn benkojn. Li devis dediĉi sian tutan tempon al la pretigo de tiu kongreso. Verŝajne la gepatroj de Edmond Privat ne permesis al sia filo misfrekventi la gimnazion, dum Hector Hodler estis pli libera. Li vivis ĉe sia patrino Augustine Dupin, unu el la pozistinoj de Ferdinand Hodler, lia patro.

A.- Kelkajn jarojn poste, en 1915, Hector Hodler skribis en artikolo titolita *Kiu eraris ?*:

Cl.- « *Ideo ne sukcesas sole per sia propra forto. Ĝi devas enkorpiĝi en homojn. La estonteco dependas, ne de niaj pranepoj, al kiuj ĉiuj malkuraĝuloj volonte fardonas la plej malfacilajn taskojn, sed de nia generacio.* »

A.- Jen vera priskribo de lia konduto. En 1906 esperanto enkorpiĝis en la junulon Hector Hodler. Kaj tio havis por li neatenditajn konsekvencojn.

Cl.- Sed, se Edmond Privat ne forlasis la lernejon, ni scias, ke li multe helpis sian kamaradon. Laŭ liaj rakontoj, kiel li diris, li praktikis la evangelian instruon :

A.- « *Petu, kaj vi ricevos, frapu, kaj oni malfermos al vi la pordon.* »

Cl.- Tagon post tago li frapis al la samaj pordoj, kaj fine li ricevis ĉion, kion li deziris : senpagaj salonegoj, aŭspiciado de la aŭtoritatoj. Kaj li sciis uzi la patronadon de famiĝintaj homoj, tutcerte la nomo de la filozofo Ernest Naville ofte estis uzata je la profito de la poresperanta batalo.

A.- Ni posedas pri tiu heroa epoko interesan tekston. Temas pri omaĝo prononcita de Pierre Bovet, eksprofesoro en la Universitato de Neuchâtel kaj eksdirektoro de Instituto Rousseau en Ĝenevo. Jen kion diris Pierre Bovet je la 9-a de novembro 1963 antaŭ vasta publiko. Ni tradukas el la franca :

Cl.- « *Mi havis la privilegion renkonti Edmond Privat en pluraj epokoj de lia vivo. La unuan fojon, tio estis ĉi tie mem, antaŭ pli ol 50 jaroj, kiam mi instruis ĉe la Beletra Katedro. Li, kies profundan modestecon oni tuj reliefigos, tiam estis ĉefe konata pro sia eksterordinara senĝenemo [en la franca : extraordinaire toupet]. Ĉeestinta, ankoraŭ gimnaziano, en la unua esperanto-kongreso en Boulogne-sur-Mer, li invitis la Kongreson kunveni la sekvan jaron en Ĝenevo, kaj li movis ĉion, kio estis necesa, por ricevi tiun kosmopolitan kunvenon.* »

A.- Jen interesa diro, kiu lumigas la atmosferon, en kiu laboris por esperanto Hector Hodler kaj Edmond Privat.

Cl.- Pri tiu laboro ni ne scias multon pli. Nur la rezulton ni konas. La dua Universala Kongreso okazis en Ĝenevo, kaj ĝia sukceso estis grandega. Hector Hodler ne estis gloremulo. En la oficialaj raportoj vi vane serĉos lian nomon. Lia junaĝo permesis al li

plenumi la rolon de ĉies helpanto. Edmond Privat certagrade ankaŭ ludis la rolon de servisto, sed tiam kun pli da gloremo. Sur la fotoj Edmond Privat preskaŭ ĉiam sidas en honor-loko, dum Hector Hodler aŭ forestas, aŭ troviĝas en last-ranga loko.

A.- Du sintenoj, kiuj respegulas du temperamentojn. Edmond Privat jam estis la ambasadoro. Hector Hodler jam estis la servisto.

Cl.- Sed tiu servemo ne malhelpis Hector Hodler intensivege travivi tiujn kongresajn tagojn. Ni scias, ke li havis longajn diskutojn kun Paul Berthelot, la fondinto de la gazeto *Esperanto*.

A.- La franco Paul Berthelot naskiĝis en 1882, do nur 5 jarojn antaŭ Hector Hodler. Ili do estis samgeneracianoj. Paul Berthelot lernis esperanton en 1900, kiam li studis en liceo en Reims. La 18-an de junio 1905 li fondis la gazeton *Esperanto*, sed li ne kapablis garantii la regulan aperadon de tiu universala informilo. Pro tio dum la dua Universala Kongreso li akceptis ĝin vendi al Hector Hodler kaj René de Saussure.

Cl.- Paul Berthelot poste sendis interesajn artikolojn al Hector Hodler pri siaj vojaĝoj en Sudameriko. Ni havos la okazon legi al vi kelkajn el ili, ĉu ĉar ili konservis sian aktualecon, ĉu pro ilia freŝeco.

A.- Paul Berthelot estis speco de esperanto-misiisto. Siajn lastajn semajnojn li ankoraŭ instruis al siaj flegistoj la zamenhofan lingvon. El tiu instruo naskiĝis latina lernolibro pri esperanto : *Compendium grammaticae Esperanto*.

Cl.- Paul Berthelot mortis jam en 1910. Li estis tiam nur 28-jara. Kiel Hector Hodler, li estis ftizulo.

A.- Alia franco, Théophile Rousseau, naskiĝinta en 1876, do 11 jarojn pli aĝa ol Hector Hodler, havis grandan influon sur la penson de nia heroo. Li provis enkonduki esperanton en la ĉiutagan vivon. En 1905 li organizis turismajn servojn pere de esperanto. Ni reparolos pri li, kiam ni raportos pri la kreo de UEA. Dum la Universala Kongreso en Ĝenevo Théophile Rousseau kaj Hector Hodler havis la okazon detalege diskuti pri la kreo de esperanto-servoj kaj de esperanto-oficejo. Théophile Rousseau mortis en Verdun, viktimo de la unua mondmilito en 1916 je la aĝo de 40 jaroj.

Cl.- Hector Hodler diskutis dum la Universala Kongreso kun alia franco, Alphonse Carles, kiu iniciatis esperanto-konsulojn. Pri tiu esperantisto ni bedaŭrinde ne havas multajn informojn, sed ĉar li vivis en Béziers, Francio, eble ni povos ricevi informojn de la tieaj esperantistoj.

A.- Hector Hodler estis for de ĉia teoriemo, ĉar li devis ĉiutage alfronti organizajn malfacilaĵojn. Li komprenis, ke la sorto de la Lingvo Internacia dependos, ne de teoria perfekteco, sed de organiza perfekteco.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-